Jarkolekto : 2008 | Numero : 1 | Paĝo : 1

# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri **Senlime** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

**Senlime**
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters,
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

---

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 3 EUR**
**Jara abono : 10 EUR**

Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ januare, **NUR** al la konto :

**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSP BE22
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

Ek de 2008, la kotizo (nedeviga sed bonvenigata) estas disigita de la abono al la papera versio de tiu-ĉi informilo (kompreneble pagenda).

---

# *Senlime*

## *invitas vin al sia Zamenhof-festo en Select* (BE-Kelmis, Lütticherstr. 264), *dimanĉon, la 9an de decembro 2007 je la 11h30.*

**Informas** Didier **Lousberg**

**Programo** :
Malfermo de la akceptejo je la 11h30 (aperitivo).
Manĝo je la 12h30, kulturaj eroj inter la pladoj :

- Kion pri la jaro 1907 en *Amikejo* ?
- Germanlingva romano disvolviĝinta en *Amikejo*
- Filmeroj pri la 100-jariĝo de la grupo *Verviersa*
- Karaokeo (kelkaj plej furoraj eroj!)
- Skeĉoj
- K.t.p. (listo ekzemplodona sed ne limiga!)

Disiĝo ĉirkaŭ la 16h30.

**Menuo** (deviga elekto inter 2 eblecoj por ĉiu el la 3 pladoj) :

1. A. Fromaĝaj fritbuloj ***aŭ*** B. salikoka koktelo
2. A. Juna koko arbara ***aŭ*** B. salma fileo
3. A. Tiramisu ***aŭ*** B. blanka damo

**Prezo** : 25 EUR (trinkaĵoj krome pagendaj)

**Deviga rezervado kaj pago *antaŭ*** la 3-a de decembro al la konto **979-5327148-10** de ***Senlime***
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSP BE22.
Klare indiku la elektitan menuon kiel pag-kialon (ekz.: AAB) aŭ sendu aliĝilon al Didier **Lousberg**, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS (lousberg@senlime.org).

# ESPERANTO
## Eŭregiona kalendaro 2008 (1/2)




***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Luttícherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

**2007-12-09** 11h30 BE-Kelmis, Select: tradicia ***Zamenhof-festo*** de ***Senlime.***
Inf. lousberg@senlime.org

**01-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: rakontos pri la «***Unuaj paŝoj de esperanto en Belgio***» Marcel **Delforge**.
Inf. mardelforge@brutele.be

**02-15** 19h30 BE-Kelmis, Select: "**spiritualeco elkodita**" de Charles **Norga**.
Inf. XX-32-(0)87-339673

**03-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: **ĝenerala asembleo de *Senlime* kaj E.G.V.**

**04-18** 19h30 BE-Kelmis, Kinarto en esperanto : ***«Angoroj»***
Inf. mardelforge@brutele.be

**05-16** 19h30 BE-Kelmis, Select: (trajn)simulado per komputilo.
Inf. jacques@senlime.org
XX-32-(0)87-330292

**06-20** 19h30 BE-Kelmis, Select: esperanta **karaoke**o.
Inf. lousberg@senlime.org

Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la: **07-18, 08-15, 09-19, 10-17, 11-21** kaj **12-07** (Zamenhof-festo).

**09-12-2007** 11h30 BE-Kelmis, Select: traditionnelle ***fête Zamenhof*** de ***Senlime.***
Inf. lousberg@senlime.org

**18-01** 19h30 BE-Kelmis, Select: Marcel **Delforge** racontera les «***Premiers pas de l'espéranto en Belgique***».
Inf. mardelforge@brutele.be

**15-02** 19h30 BE-Kelmis, Select: "**La spiritualité décodée**" par Charles **Norga**.
Inf. XX-32-(0)87-339673

**21-03** 19h30 BE-Kelmis, Select: **Assemblée générale de *Senlime* et E.G.V.**

**18-04** 19h30 BE-Kelmis, Cinéma en espéranto : ***«Angoroj»*** ["Angoisses"]
Inf. mardelforge@brutele.be

**16-05** 19h30 BE-Select: simulation (de train) sur ordinateur.
Inf. jacques@senlime.org
XX-32-(0)87-330292

**20-06** 19h30 BE-Kelmis, Select: **karaoké** en espéranto.
Inf. lousberg@senlime.org

Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **18-07, 15-08, 19-09, 17-10, 21-11** et **07-12** (fête Zamenhof).



# Niaj programeroj lupee

## *detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…*

**Unuaj paŝoj de Esperanto en Belgio**

Ŝajnas ke la unua esperantisto en Belgio estis S-ro Armand Dethier en 1892. Li, kiel Direktoro de Filatela Asocio, ĉefe interesiĝis pri rilatoj inter esperantistoj laù tia aspekto.

Poste venis granda figuro de la naskiĝo de la Movado (Charles Lemaire) kaj fondiĝo de la unuaj kluboj.

Ĝis la unua Universala Kongreso, en Boulogne-sur-Mer, multaj anekdotoj okazis .

Poste venis la bedaùrinda IDO-krizo (en 19O8) kaj la terura unua mondmilito.

En 1918, la movado iom post iom renaskiĝis en Belgio kaj multaj kongresoj, ofte naciskale, reaktivigis ĝin.

Fine, en 1978, laù politika evoluo en nia lando, restrukturiĝis la tuta afero (naskiĝo de regionaj Asocioj).

Kiel kutime, multajn kopiojn de bildoj mi prezentos al vi. Bonvenon !

Marcel **Delforge**

**01-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: rakontos pri la «***Unuaj pashoj de esperanto en Belgio***» Marcel **Delforge**.
Inf. mardelforge@brutele.be

**Ĝeneralaj asembleoj de E.G.V kaj Senlime**

Unue, memoru ke **E.G.V.**, loka grupo dependanta de la valona asocio por esperanto (APE), tute disas de ***Senlime***, translima “kupola“ asocio (sendependa).

Nek unu nek la alia estas “asocio sen profita celo“ (ASPC) : ambaŭ estas nur “association de fait“ [asocio pro fakto] laŭ la belga juro : ili ne havas personecon juran (kaj posedas nek rajtojn, nek devojn), do ne povas kontrakti... nek posedi ion ajn.

Sekve de tiu manko pri jura personeco, la “asocio pro fakto“ ne havas jurajn devojn sed la membroj persone responsas pri la ŝuldoj de la asocio. Ĉiu membro senlime responsas pri (tamen nur po parto de) la ŝuldoj de la asocio !

La reguloj pri la administrado de la asocio estas (laŭ la belga leĝo) difinitaj en la statutoj.

Pro tio, jure kaj praktike, utilas ke la membraro kunvenu por priparoli la funkciadon de la asocio (kaj eventuale tiucele kreu kaj modifu statutajn regulojn).

Se estos nenio pridiskutinda, ni kompreneble povos divers-maniere pasigi la tempon, ekzemple dank'al (trejnado por) karaokeo en esperanto…

Jean-Marie **Jacques**

**03-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: **ĝenerala asembleo de *Senlime* kaj E.G.V.**
Inf. jacques@senlime.org

**Trajnsimulado per komputilo**

Ekzistas pluraj softvaroj pri fervoja simulado sur la merkato de la komputilaj ludoj sed la tiufakaj referencoj, “Microsoft Train Simulator“ kaj “Auran Trainz“, postulas potencan komputilon.

“**ArcRail**“, malpli postulema, simulas la mision de kondukisto kiu devas manovri sian trajnon respektante la signalaron (kaj sendanĝere renkontpasi aliajn trajnojn). La ludo proponas variajn pejzaĝojn. Ĝi enhavas eldonilon por krei siajn proprajn vojirojn, malfeliĉe ne sufiĉe realismaj.

“**Boso View Express**“ **(BVE),** senpaga japana ilo, multe pli realisme simulas la kondukon de trajno, kun tre altkvalita grafismo. Ĝi kalkulas la reagon de la trajno laŭ ĝiaj teknikaj proprecoj, la linia kliniĝo, la kurva radio, k.t.p.

Multaj vojoj, trajnoj, subtrajnoj kaj tramoj rete elŝuteblas*(1)*.

Per komplementa softvaro eblas krei siajn proprajn vojirojn. Eble ***Senlime*** tiel povos virtuale rekrei la germanan tramvojon Akeno-Kelmis, kiu servis de marto 1907 ĝis 1944…

Jean-Marie **Jacques**

**04-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: trajnsimulado per komputilo.
Inf. jacques@senlime.org
XX-32-(0)87-330292

***(1)*** http://www.bve-routes.com/

# Literaturo

## verko de Dagmar Leupold rilatas al *Amikejo*




***Grüner Engel, blaues Land***
***[Verda anĝelo, blua lando]***
**Germanlingva romano/rakonto**
de Dagmar **Leupold**

2007. 204 S. bindita
C.H.Beck
ISBN 978-3-406-55617-3

Aper-dato: 2007-02-15.

Rete aù librovendeje aĉetebla :
17.99 EUR

Ne tradukita en esperanton... sed konsilinda al germanlingvanoj (esperantistoj aŭ ne).

Simile, por franclingvanoj, aĉeteblas “Le général et l'anti-babel” de Pierre Nemours (franclingva spion-romano rilatanta, ne al Moresnet sed jes ja, al esperanto) :

ISBN: 978-2-265-00776-5
Eldonis : Editions Fleuve noir
Aper-dato : 1978

Dagmar LEUPOLD, kiu naskiĝis la 23-an de oktobro 1955 en Niederlahnstein (Koblenz) estas germana verkistino. Ŝi studis germanistikon, filozofion kaj antikvan filologion en Marburg kaj Tübingen kaj doktoriĝis en 1993 en Novjorko pri kompara literatura scienco. Ŝi publikigis plurajn poemarojn kaj romanojn. En Esperantio, si konatiĝis pro sia germanlingva romano "***Grüner Engel, blaues Land***" ("***Verda anĝelo, blua lando***") aperinta en 2007. Ĝi temas pri historiisto, kiu verkas biografion pri ZAMENHOF kaj invitas sian amatinon al **Moresnet**.

In ihrem neuen Roman erzählt Dagmar Leupold die ungewöhnliche Liebesgeschichte zweier vom Leben Enttäuschten: der Archäologin Sophia, die ihr Geld damit verdient, Produktnamen für Parfüms zu erfinden, und des Historikers Johannes, der an einer Biographie des Esperanto-Erfinders Ludwig Lazarus Zamenhof schreibt. Er lädt Sophia, die er bislang nur angelächelt hat – zu beider Überraschung – auf einen Abstecher nach Belgien ein, in die Nähe von Liège, wo es mehr als hundert Jahre lang ein neutrales staatsähnliches Gebiet gegeben hat, Moresnet, das beinahe der erste Esperanto-Staat geworden wäre.

Sophia trauert ihrer großen Liebe zu einem verheirateten Mann nach, Johannes ist seit einem Kindheitstrauma stumm, es sind sozusagen zwei Versehrte. In der heruntergekommenen Ferienanlage, in der sie sich eingemietet haben, gesellt sich Annika, ein rührend unschönes Mädchen, zu ihnen, das, wenn überhaupt, offenbar nur Russisch spricht. In den sieben Tagen ihrer Reise, im Herzen Europas und am verwahrlosten Schauplatz einer sozialen und politischen Utopie, der nur noch landschaftlich paradiesisch wirkt, entwickelt sich eine unwahrscheinliche, aber durchaus folgenreiche Liebe.

Poetisch und intelligent, rasant und nachdenklich folgt Dagmar Leupolds Roman seinen beiden Hauptfiguren auf ihrer Reise in ein neues Leben.

En sia nova romano, Dagmar Leupold rakontas pri la nekutima amhistorio inter du elreviĝintuloj : la arckeologistino Sofia, kiu sin vivtenas inventante produkt-nomojn por parfumoj, kaj la historiisto Johano, kiu verkas biografion de la esperanto-inventinto Ludoviko Lazaro Zamenhof. Li kondukas Sofian, al kiu li ĝis tiam apenaù ridetis – je ilia komuna surprizo – okaze de ekskurseto al Belgio, proksime de Lieĝo, kie antaŭ pli ol cent jaroj ekzistis eta ŝtatsimila teritorio neŭtrala, Moresnet, kiu preskaŭ fariĝis la unua Esperanto-ŝtato.

Sofia priploras sian grandan amon al viro poste edziĝinta, Johano estas muta sekve de infanaĝa traŭmatismo; ili do ambaŭ estas, por tiel diri, handikapituloj. En la feriejo kie ili luprenis loĝejon, kuniĝas al ili Anika, tuŝa nebelulino, kiu pli-malpli kompreneble parolas nur la rusan. Dum ilia sestaga vojaĝo kerne de Eŭropo kaj sur la forlasita teatrejo de sociala kaj politika utopio, kiu nur ŝajne estas paradiza pejzaĝo, disvolviĝas neprobala sed sekvoriĉa amo.

Poezia kaj inteligenta, rapida kaj pripensiga, la romano de Dagmar Leupold sekvas siajn du ĉefrolulojn survoje al nova vivo.

# Esperanto en Verviers

## *100 jarigho de la esperanto-grupo (2007-10-14)*

Promenado de fontano al fontano (José ***Jacob***, prezidanto de la Verviersa grupo, portis la flagon)





Oficiala akcepto en la urbo-domo far' skabeno ***Breuwer*** nome de la urbestraro

Bankedo (en restoracio ***Victoria***, fronte al la stacidomo)





Projekciado de la filmo « ***Incubus*** » sur granda ekrano en « spaco Duesberg » (kultura centro Verviersa)

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

# Ĉu esperanto utilas ?

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.-M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte
n°: **000-0245571-64**
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB1
de:
Esperanto grupo
25 Rue Pierre Fluche
BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime**, restée inchangée depuis sa création, est maintenant facultative et laissée à l'appréciation de chacun (mais l'abonnement à ce bulletin en version «papier» reste payant : 10 €).*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2008** (EGV) **14 €**
**U.E.A. 2008** (MA) **58 €**
***Senlime*** **(abonnement) 10 €**

**en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire, l'année *«cotisation de …. pour ….».***

***Ĉiutage ĵurnaloj, gazetoj, televido, radio, bombadas nin kun teruraj novajxoj, kiuj pensigas nin ke ĉio en la mondo estas malbone. Sed ne, de tempo al tempo alvenas al ni belaj, emociigaj, informoj. En Ĉinio, kie ili loĝas, ĵus geedziĝis Michel Fontain, franca esperantisto, kaj Neĝeta, ĉina esperantistino.***

Ili konatiĝis unue pere de Interreto, kie ili babiladis kaj kune lernis kaj praktikis Esperanton. Poste ili renkontiĝis en Ĉinio. Michel aliĝis al la Esperanta Asocio de Pekino en 2004, kaj ili persone, vidalvide, povis konatiĝi, kaj ekenamiĝis.

Burokrataj malfacilaĵoj flanke de Francio kaj de Ĉinio malpermesis ilin dum longa tempo realigi sian revon. Tempo pasis, paperaĵoj multiĝis, burokrataĵoj malhelpis. Sed kun pacienco oni atingas ĉion. Kaj ili finfine sukcesis geedziĝi.

Kaj nun tiu geedza profesoraro instruas esperanton al junaj ĉinoj. Certe ĉiuj estas feliĉaj. Kaj ambaŭ entuziasme kiel ĉiam daŭrigos sian grandan kaj efikan laboron en la instruado kaj disvastigado de nia lingvo.

Por koroj ne ekzistas baroj. Esperanto unuigas homojn. Multaj homoj, demandas al mi ĉu Esperanto estas utila. Kaj mi demandas: "kion opinias pri tio la legantoj de ĉi tiu artikolo?"

Eternan feliĉon por Neĝeta kaj Michel!

Augusto Casquero

***Chaque jour les journaux, la télévision, la radio, nous bombardent de terribles nouvelles, qui font penser que tout au monde va mal. Mais non, de temps en temps nous arrivent de belles et émouvantes infos. En Chine, où ils habitent, Michel Fontain, espérantiste français, et «Petite Neige», espérantiste chinoise, viennent de se marier.***

Ils se sont connus par internet, où ils ont chatté, étudié et pratiqué ensemble l'espéranto. Puis ils se sont rencontrés en Chine. Michel est devenu membre du groupe de Pékin en 2004, et c'est là qu'ils se sont rencontrés et tombés amoureux.

Les difficultés bureaucratiques de la France et de la Chine les ont longtemps empêchés de réaliser leur rêve. Mais avec de la patience on arrive à tout. Et finalement ils ont réussi à se marier.

Et maintenant ce couple de professeurs enseigne l'espéranto à de jeunes chinois. Ils sont certes tous heureux. Et tous deux continueront avec enthousiasme et efficacité leur travail d'enseignement et de propagation de notre langue.

Pas de barrières pour les cœurs.
L'espéranto unit les hommes. Nombreux sont ceux qui me demandent si l'espéranto est utile. Et je demande : "qu'en pensent les lecteurs? "

Eternel bonheur pour «Petite neige» et Michel !

Auguste Casquero

# Aliĝilo: Zamenhof-festo 2007

Ĉiu partoprenonto nepre kompletigu apartan aliĝilon (aù fotokopion) kaj alvenigu ĝin plej malfrue
la 3-an de dec. 2007 al S-ro Didier LOUSBERG, 25 rue Pierrre Fluche, BE - 4800 VERVIERS.

S-ro/S-ino/F-ino: ______________________

Naskiĝdato: ____ ____ ____ (jaro, monato, tago)

familia nomo (por alfabeta ordigo)

antaŭnomo aŭ persona nomo

Adreso: ______________________

strato kaj numero

landa kaj urba kodoj — urbo

tel. n-ro (kun zona prefikso) — faks. n-ro (kun zona prefikso).

ret-adreso

- legis, komprenis kaj aprobas la aliĝkondiĉojn,
- aliĝas al la Zamenhof-festo de ***Senlime*** la 9-an de decembro 2007 en Kelmis,
- **<u>mendas</u>** varman tagmanĝon je la prezo da **25 EUR** (trinkaĵoj krompagendaj).

- **<u>en la jena menuo, elektas</u>** (faru ***- nur -*** **<u>unu</u>** krucon por ĉiu el la 3 pladoj) :

1. ☐ fromaĝaj fritbuloj ***aŭ*** ☐ salikoka koktelo
2. ☐ juna koko arbara ***aŭ*** ☐ salma fileo
3. ☐ Tiramisu ***aŭ*** ☐ blanka damo

**- <u>antaŭe pagos tiun sumon al la konto de Senlime :</u>**

**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSP BE22
***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, BE-4800 VERVIERS

Nur eksterlandaj aliĝintoj[1], se necese (pro translima pagproblemo) rajtas surloke pagi
sed <u>***Senlime*** nepre fakturos la mendita(j)n manĝo(j)n kaze de ne-partopreno</u>

Tiukaze la mendinto/subskribinto persone responsas pri la surloka pago (per EŬRoj) de sia mendo
(nenial surloke uzu ĉekojn, ĝirilojn, iamajn aŭ ekster-eŭropajn monerojn, k.t.p. !).

Dato: ____ ____ ____ (jaro, monato, tago)

Subskribo:

[1] Nur tiu kiu ĝustatempe alvenigis la aliĝilon al S-ro LOUSBERG estas aliĝinto !